


POLA ESPERANTISTO

JARO XXIII. MARTO 1929. * NR. 3.



ROK XXIII. MARZEC 1929. * NR. 3.

ESPERANTYSTA POLSKI

WYDAWCY: POLA ESPERANTISTA KLUBO &
ELDONANTOJ: SOCIETO ESPERANTO EN KRAKÓW

ADRES: KRAKÓW, ULICA LUBICZ Nr. 34.

REDAKTOR PROF. DR. ODO BUJWID **REDAKTANTO**

PRENUMERATA: rocznie Zł. 8.—, półrocznie Zł. 4.—. Dla towarzystw grup esperanckich (przy przesylce najmniej 5 egz. pod jednym adresem roczna prenumerata Zł. 6.—.

ABONO: jare Zł. 8.—. duonjare 4.—. Por societoj kaj grupoj esperantistaj (ĉe sendo de minimume 5 ekz. al unu adreso) jarabono Zł. 6.—

Konto Pocztovej Kasy Oszczędności Kraków Nr. 406.660.

Eksterlande jarabono — 1 dolaro.

Pojedynczy numer Zł. 0.70 Aparta numero.

OGŁOSZENIA:

ANONCOJ:

1 strona	Zł. 60.—	1 paĝo	Zł. 60.—
1/2 strony	„ 32.—	1/2 paĝo	„ 32.—
1/4 strony	„ 17.—	1/4 paĝo	„ 17.—
1/8 strony	„ 10.—	1/8 paĝo	„ 10.—

TREŜĆ — ENHAVO:

JAN KOSTECKI: ANTONI LANGE. **DR. ADAM GADOMSKI:** LA POLAJ MALKOV RINTOJ KAJ VOJAGINTOJ. **FEZ:** EL MIA VERDA PAPERUJO. **JAN KOSTECKI:** SINJORO U. E. A. POL-LANDA KRONIKO. KRONIKA ZAGRANICZNA. **DR. L. DREHER:** UZUPEŁNIENIA GRABOWSKIEGO. **BULTENO DE U. E. A. ADMINISTRACIAJ SCIIGOJ.**

POLA ESPERANTISTO

MONATA REVUO DE ESPERANTISTA MOVADO EN POLUJO
KAJ EKSTERLANDE.

ESPERANTYSTA POLSKI

MIESIĘCZNY PRZEGLĄD RUCHU ESPERANCKIEGO W POLSCE
I ZAGRANICĄ.

ROK XXIII. JARO.

KRAKÓW
MARZEC 1929 MARTO

Nr. 3 N-o.

ANTONI LANGE.

Dnia 17 marca 1919 r. zmarł w Warszawie Antoni Lange. Wybitny poeta, człowiek kulturalny, marzyciel wiecznie młody, Esperantysta z przekonania i z praktyki.

Mówi greckie przysłowie, że ukochani przez bogów umierają młodo. Ale powiedziec również można, że ukochani przez muzy zawsze zostają młodymi. Sprawdziło się to na Langem, którego cała twórczość dowodzi, że do ostatniej chwili dość długiego życia (urodził się w r. 1861) potrafił zachować niekniętym skarb młodości. Zachował strzelistość myśli i bogactwo formy, i ukochanie ideału, i wiarę cudowną w to, że ideały ziścić się muszą, i wzrok utkwiony w przyszłość, we wschodzące słońce jutra.

Syn powstańca polskiego rozumiał i czuł Powstanie. Ogromną, wyteżoną tęsknotę zbiorowości ludzkiej do zerwania kajdan z ciała narodu. Śpiewał nam Lange „Pierwszy dzień stworzenia”, w którym się bu-

La 17-an de marto 1929 mortis en Warszawa Antoni Lange. Eminentel poeto, kultura homo, revemulo eterne juna, Esperantisto konvinka kaj praktika.

Greka proverbo diras, ke amatoj de dioj mortas junaj. Sed oni povas ankaŭ diri, ke amatoj de muzoj ĉiam restas junaj. Tio montriĝis vera ĉe Lange, kies tuta verkeco pruvas, ke ĝis la lasta momento de sia sufiĉe longa vivo (li naskiĝis en la j. 1861) li scipovis konservi netuŝebla la trezoron de l' juneco. Li konservis la altflugon de l' penso kaj riĉecon de l' formo, kaj la amon de idealo, kaj la kredon mirindan je tio, ke la idealoj devas realiĝi, kaj la rigardon fiksitan en estonteco, en la leviganta suno de l' morgaŭo.

Filo de pola insurekciulo, li komprenis kaj sentis la Insurrekcion; la gigantano, streĉitan sopiron de l' homamaso al disŝiro de katenoj de la nacia korpo. Lange kantis „La unuan tagon de kreiĝo”, en kiu vekigis titanoj, krevas montoj, tremas

dzą tytany, pękają góry, dygocze od wewnętrznej męki ziemia skorupą lodów syberyjskich jeszcze okuta, lecz już dysząca wiosny ludów przecuciem.

A potem, z miłości ojczyzny krzesząc miłość człowieka i z pożądania wyzwolin narodu — żądę wyzwolin ludzkości, wyzwolin ducha ludzkiego z okowów tej ziemskiej powłoki, która go małym czyni w przestrzeni i krótkim czasie, Lange swoją fantazją i wiedzą stworzył przed nami mirażę potęgi i władztwa nad siłami przyrody. Czytaliśmy wszyscy te zadziwiające opowieści „z czwartego wymiaru“, w których złuda kojarzy się z realnością i nad nią króluje. Lecz tyle już razy powiedziały nam czasy obecne, że najśmielsza złuda żywą prawdą się staje, tyle razy za wizją marzyciela zwycięsko kroczył mikroskop i cyrkiel uczonego, żeśmy się nauczyli czcić tych, co odwagą natchnienia moszczą drogi dla wiedzy.

A potem, Antoni Lange stał się duchem czystym, od materji wolnym, i uleciał w przeszłość pradawną: nad szare wody Nilu, nad brzegi świętego Gangesu, by u kolebki rodzaju naszego wskrzeszać umarłe. Jego wolą ożyły ludy zapomniane i przemówiły do nas językiem naszego świtu. Pra-aryjski duch ocknął się ze snu tysiącleci w obliczu wieku XX-ego. Zaś dusza poety chyliła się nad nim w zadumie, badając, co to dalekie wczoraj dać może śnionemu jutru.

Bo Lange w głębi swej kulturalnej istoty, we krwi młodego marzenia był zawsze poetą jutra. Dlatego zgrzybiała starość,

pro interna sufero la tero kovrita ankoraŭ per skvamo de siberiaj glacioj, sed jam spiranta per antaŭsento pri la printempo de popoloj.

Kaj poste, pro l' amo al patrujo ekbruligante la amon al homo kaj el la deziro liberigi la nacion — la deziron liberigi la homaron, liberigi la homan spiriton el la katenoj de tiu tera kovraĵo, kiu lin faras malgranda en la spaco kaj mallonga en la tempo, Lange per sia scio kaj fantazio kreis al ni miraĵojn de potenco kaj estreco super la fortoj de l' naturo. Estas tradukitaj en Esperanto kelkaj el tiuj mirindaj rakontoj „el la kvara dimensio“, en kiuj la iluzio kuniĝas kun realeco kaj regas super ĝi. Sed tiomfoje jam rakontis al ni la nuntempo, ke la plej kuraĝa iluzio fariĝas viva realo, tiomfoje la vizion de revemulo venke postesekvis la mikroskopo kaj cirklo de l' scienculo, ke ni jam scias adori tiujn, kiuj per la kuraĝo de l' inspiro ebenigas la vojon por la scienco.

Kaj poste, Antoni Lange fariĝis pura spirito, libera de materio, kaj forflugis en pasintecon pratempan: al la grizaj akvoj de Nilo, al la bordoj de l' sankta Ganges, por ĉe la lulilo de nia gento viviĝi la mortintojn. Per lia volo reviviĝis popoloj forgesitaj kaj ekparolis al ni per la lingvo de nia tagiĝo. Praaria spirito vekigiĝis el la miljara sonĝo en la XX-a jarcento. Kaj la animo de l' poeto kliniĝis super ĝi enpense, esplorante, kion la malproksima hieraŭo povas doni al la sonĝata morgaŭo.

Ĉar Lange en la profundo de sia kultura esenco, en la sango de l' juna revo estis ĉiam poeto de morgaŭo. Tial la kaduka

przeszłość tylko widząca, pojąć go nie może i odmawia mu ideału. Jemu, który był ideału dzieckiem i ideału sługą! Który się zrodził niejako z powstania i szedł przez życie wpatrzony w powstanie: powstanie Polski i powstanie Czasów Nowych, przez nikogo jeszcze niezgłębianych, tajemniczych, wspaniałych, olbrzymich.

Antoni Lange był pierwszym z mistrzów słowa polskiego, który uznał w pełni wartość dzieła Zamenhofa. Nietylko szczerze udzielał pozwoleń na esperanckie przekłady swych utworów, nietylko jako Esperantysta brał udział w życiu naszego ruchu, lecz nawet swem złotem piórem po esperancku pisał i tworzył.

Za to zrozumienie, za tę pierwszość dostojną magnata myśli i uczucia, nasz młody świat esperancki jest mu wdzięczny i wdzięczny zostanie.

maljuneco, vidanta nur la pasintecon, ne povas lin kompreni kaj rifuzas al li idealon. Al li, kiu estis ido de l' idealo kaj de l' idealo servanto! Kiu naskiĝis el insurekcio kaj iris tra l' vivo kun la okuloj fiksitaj en insurekcio: insurekcio de Polujo kaj insurekcio de Tempo Nova, de neni ankoraŭ esplorita, mistera, grandioza, giganta.

Antoni Lange estis la unua el majstroj de pola vorto, kiu plene rekonis la valoron de Zamenhofa verko. Ne nur li malavare donis permesojn traduki en Esperanto siajn verkojn, ne nur kiel Esperantisto partoprenis en la vivo de nia movado, sed eĉ per sia ora plumo esperante skribis kaj verkis.

Por tiu kompreno, por tiu unueco grandioza de riĉegulo de penso kaj sento, nia juna mondo esperantista al li estas kaj restos danka.

Jan Kostecki.

LA POLAJ MALKOVRINTOJ KAJ VOJAĜINTOJ.

(Fino)

La jaroj 1863—5, post falo de la januara insurekcio kaŭzas novan ondon de la rusa teroro, kaj kun ĝi multajn ekzilojn al Siberio, kie ekzilitaj sciencistoj, Poloj, esploras tieajn regionojn.

Ĉi-tie oni povus citi la nomaron de ŝatataj ekzamenintoj, kies gloro ne ekbrilis nur pro escepta karaktero de tiuj-ĉi politikaj forpelitoj. El inter ili la mondfamon akiris la multe konata esplorinto de Bajkal, Benedikto Dybowski (dibofski), kondamnita je 15 j. de ekzilo al Siberio pro partopreno en la januara insurekcio, la ĝusta malkovrinto de bajkala faŭno, la esplorinto de Amura, Usuria kaj Ĉemara landoj. Pri la graveco de liaj malkovroj el sferoj de bajk. faŭno pravas la fakto, ke la petersburga geografia societo premiis Dybowski'n, kvankam li estis forpelito, per la ora medalo. Dybowski post la liberigo de la forpelo esploris dum 5 jaroj Saŝalinon kaj Kamĉatkon, kaj dum la ekspedicio al la insulo de Bering li famiĝis pro siaj provoj de la aklimatigo de renocervoj kaj ĉevaloj. La indiĝenoj, komence malamike agordigitaj al tiuj-ĉi novaĵoj, baldaŭ pritaksis la bonfaron de

l' provoj, des pli, ke la alklimatigo sukcesis kaj fariĝis la fonto de riĉeco de la loka loĝantaro. Tial la loĝantoj de la insulo adoris Dybowski'n kiel neteran senditon, volis lin elekti sia estro, kaj sian dankemon por li tiamaniere ili videbligis, ke ili sendis donace al li ostaron de la mara bovino (ĝi troviĝas nun en muzeo de la universitato en Lwów). Grandegaj sciencaj perlaboradoj de Dybowski, zoo-geografia, antropologia kaj etnika starigas tiun-ĉi esplorinton kiel unuarangan mondfaman vojaĝinton azian kaj plej eminentan naturscienculon polan en XIX jrc.

Noto de l' redaktanto. La Estiminda persono de prof. Dybowski estas al ni, Esperantistoj, des pli kara, ke li estas nia Samideano kaj vigle interesiĝas pri aferoj de l' nia lingvo. Fiero plenigas niajn brustojn, ke en niaj vicoj troviĝas tiu-ĉi fama scienculo, kiu malgraŭ sia grandaĝo, emas okupiĝi pri nia ideo. La plej bona pruvo de lia prosperanta vigleco povas esti lia ampleksa kaj interesa letero sendita pasintjare al Pola Kongreso en Kraków, poste publikigita en Pola Esp-isto N-roj 6 kaj 7.

Krom tio la mondfamon kiel vojaĝintoj kaj malkovrintoj akiris du Poloj en servo de la rusa registaro nome: Przewalski (pŝevalski) kaj Grąbczewski (grompĉefski) esplorintoj kaj konantoj de Tibet, Pamir kaj Karakorum en Centra Azio. Tiujn-ĉi du vojaĝintojn aneksis por si Rusoj, prezentante ilin kiel siajn scienculojn kaj kiel rusaj ili estas malĝuste opiniataj.

Gen. Grąbczewski mem revindikis sin por Polujo en siaj vojaĝsciencaj publikikaĵoj, skribitaj pole, kiam li ekloĝis por ĉiam en Warszawa. Liaj verkoj evidentigas imponegajn rezultojn de liaj malkovraj esploroj, kiujn li entreprenadis al nekonataj teritorioj, dividantaj posedaĵojn rusajn de ĉinaj kaj afganistanaj, kiuj antaŭ Grąb. estis signitaj sur geografiaj kartoj per blankaj makuloj. G. esploras Kaŝgarion, atingas fontojn de Sir Dario, enprofundiĝas en Himalaĵojn, trapuŝas sin al nealirebla Tibeto, esploras „Tegmenton de la mondo“ — Pamiron, malkovras ne konatan ĝis tiam montan grandegulon malantaŭ Himalaĵoj (Anglo Yunghusband, kiu nur post Gr. atingis tiun-ĉi monton, aneksis por si la famon de la malkovro). En kelkaj siaj ekspedicioj li arigis kaj venigis Eŭropon riĉajn kaj multvalorajn etnografiajn, botanikajn, geologiajn kaj natursciencajn kolektojn. Kaj la Petersburga Geografia Societo sugestis la sciencan mondon, ke tiujn ĉiujn gravajn malkovrojn efektivigis — Ruso „Grombczewskij“.

Przewalski vojaĝadis de 1870—1888 kaj tiam li vizitis Mongolion, Manĝurion, nordan Ĉinujon, Tibeton, orientan Turkestanon kaj najbarajn montojn. Pri la valoro de liaj malkovroj pruvas plej bone la fakto, ke kiam Przewalski en 1888, dum preparadoj al sia kvina malkovra ekspedicio, mortis en urbo Karakol, la rusa registaro nomis ĝin Pŝevalsk, honorigante per tio-ĉi la faman malkovrinton. Przewalski estis Polo, simile kiel tuta lia familio, tamen pro reganta tiam cara teroro li ne povis publike konigadi sian naciecon. Li bedaŭrinde ne ĝisvivis la liberan Polujon, en kiu li povus persone konfesi, al kiu nacio li apartenas, tamen laŭ multaj liaj restigaĵoj, laŭ lia verkaro oni povas decide atesti, ke li estis Polo, kiu Rusoj klopodis malĝuste aneksi.

Fine apud Grąbczewski kaj Przewalski staras kolonelo de la cara armeo Leon Barszczewski (barŝĉefski), la esplorinto de Pamir, Altaj, Turkeŝtano, Buĥaro kaj Afganistano, kiu pasigis 21 j. dum sciencaj vojaĝoj tra Azio. Barszczewski estis la unua esplorinto de glaciaroj en Azio, kaj liaj esploroj pro sia graveco komencis novajn direktojn en tiu-ĉi fako de la scienco.

El la supraj notoj estas evidente kiel gravan rolon ludis polaj vojaĝintoj en esploradoj kaj malkovradoj de Azio.

Remenciante la alpolusan ekspedicion de Nobile kaj perdiĝintan kunligite kun ĝi, la plej eminentan polusan esplorinton, Amundsen'on ni devas rememorigi, ke Amundsen la unuan sian ekspedicion okazigis en 1898, kiel oficiro de la belga ekspedicio al la suda poluso, en kiu la scienca direktanto estis Polo, Henriko Arctowski, nune prof. de geofiziko ĉe la universitato en Lwów. Tiu-ĉi eksp., en kiu partoprenis ankaŭ dua Polo, prof. Dobrowolski, la aŭtoro de verko „Alpolusaj Eksped.“ alportis al Arctowski la mondfamon en vojaĝeco. La celo de l' eksp. estis esploro de nekonataj subpolusaj ĉirkaŭaĵoj, kaj kiel rezulto estis, ke la ŝipo tranaĝis inter glacioj ĝis 71° 30, de l' suda larĝeco malgraŭ ne plej bonaj provizoj, travintris, kiel la unua entute, sub la poluso.

Dank' al energio de Arctowski oni esploris en ege malfavoraj cirkonstancoj la naturon de nekonataj landoj kaj oni pruvis, ke Antarktido estas la firma tero kaj la aparta mondparto, sur kiu etendiĝas potenca montara sistemo, alta ĝis 4.500m. Eksp. de Arct. pruvis krom tio, ke ekzistas granda ĉenero de lando de Graham, kvazaŭ plilongigo de Suda Ameriko en Antarktido. Oni do povas opinii Arctowski'n kiel la ĝustan malkovrinton de la nova mondparto, nomita Antarktido.

Kaj jen Jan de Kolno la unua paŝis en XV jrc. sur la amerika kontinento kaj migradis eĉ en la ĉirkaŭaĵoj de Nordpoluso; en fino de XIX jrc. Polo Arciszewski la unua pruvis la ekzistadon de Antarktido kaj la unua travintris sub Sudpoluso.

En tiu-ĉi artikolo ni citis nur la malgrandan nomareton de la polaj malkovrintoj kaj esplorintoj, ni lokigis nur nomojn kun la mondsignifo. Kaj kiom da nomoj pro persekutadoj de la konkirintaj ŝtatoj restis tute kaŝitaj kaj forgesitaj! Jen ekz. ĉe ekzamenadoj de Saĥalin, kaj precipe kiel esplorinto de folkloro kaj lingvo de Ainoj multe meritiĝis Bronislavo Piłsudski (piŭsucki), la frato de la Marŝalo. Saĥalin, malĝoje enskribiĝinta en la memoro de Poloj, kiel lando de la ekziloj, distingiĝas per tre severa klimato kaj ĝi posedas formortantan iom post iom indiĝenan loĝantaron de Ainoj, tre interesan antropologian kaj etnikan tipon. Br. Piłsudski dum sia ekzilo al Saĥalino eternigis por scienco la lingvon kaj kutimojn de tiuj-ĉi Ainoj.

La liston de niaj esplorintoj kaj vojaĝintoj daŭrigas: Adam Sierakowski (sjerakofski), la esplorinto de Berberio; Jan Kubary, la espl. de Polinezio; Vaclavo Rzewuski (jevuski), la espl. de Oriento; dro Emil Habdank Dunikowski, la espl. preskaŭ de la tuta mondo, esceptante Aŭstralion; Aleksander Czekanowski (ĉekanofski), la espl. de Siberio, la geologiisto kaj la paleontologiisto; la senlaca vojaĝinto, tragedie mortinta, Jan Czerski (ĉerski), paleologiisto kaj ge-

ologiisto; plue la botanikisto Łagowski (ŭagofski); arĥeologiisto Witkowski (vitkofski) — ĉiuj laborantaj en malfavoraj cirkonstancoj sur Siberio post 1863-a jaro.

Tiuj ĉiuj polaj esplorintoj de Malproksima Oriento laboradis science pro la propra iniciato, dum la plej malfacilaj cirkonstancoj de la vivo, kaj nur poste ili kunariĝis ĉe la Geografia Societo en Irkuck, kies kolektojn materialojn kaj helpon ili profitis.

Fine tiun-ĉi liston oni devus kompletigi per nuntempaj vojaĝanto, kiuj jam laboras en aliaj, pli bonaj cirkonstancoj, ĉar en libera kaj sendependa Polujo, por kies Nomo la antaŭaj laboradis, suferadis kaj mortis. Tiujn ni devas nun rememorigi kaj konfirmi iliajn meritojn.

Dr. Adam Gadomski.

EL MIA VERDA PAPERUJO.

(anguleto de pekaj pensoj)

Kial ofte, knabineto,
El sub via palpebreto
Larma falas en sekreto
Signo de l' enu'?...

Vi ja floran havas vojon,
Junekoran vivoĝojon,
Oni vivas unu fojon,
Vivu do en ĝu'...!...

Se junulon ploras koro,
Ĝi sekigo de la ploro...
Laŭ ordono de l' Amoro
Venos du aŭ tri...

— Ne pro perdo de l' junulo
Plorenuas la okulo.
En animo mia — brulo!...
Ho, malĝojas mi,

Ĉar forlasis min espero,
Ĉar sur nia peka tero
De la vero eĉ fajrero
Ne briletas jam.

False fluas vivoondo,
Falsa — proksimula rondo,
Falsa, falsa tuta mondo,
Falsa estas am'....

En vino estas vero — romanoj nin
instruis —
Sendube, ĉar praavoj la vinon veran
ĝuis.


Ni tamen, bedaŭrinde, ne povas diri
tiel,
Ĉar nia vino — vera estas ja neniel.

Amo estas ĉarma floreto,
Ĝi estas ĝojo, ĝi estas ĝu'!
Sed frukto ĝia estas necesa,
Kiel en ŝipo truo aŭ du...

Se vi volas kun la amiko
Bone kaj pace interrilati,
Vi devas ĉiam (pleja efiko!) —
Ĉiam lin laŭdi kaj ĉiam flati.

Ne tiu estas la amiko vera
Kies bonfaroj laŭte sonas, bruas,
Kaj kies sento duone sincera
Nur dankesprimon, laŭdon sole ĝuas.
Sed tiu estas, kies granda koro
Bonon farinte, restas mem ŝirmite.
Kaj proksimulon en malĝoja horo
Sen dankespero, savas — inkoqnite.

Fez.



kaj sciis, kiom signifas, kiam virino demandas pri de Torros aŭ io simila.

Donna Anna ekflamis per kolero kaj decidis puni la kavaliron.

— Ho vi kuraĝulo, vi ankoraŭ kuŝos ĉe miaj piedoj — kaj mi diros tiam al vi: bone, bone!

Ŝi estis ja prava filino de sia patro kaj havis grandan fieron pri si.

Okazis do, ke kiam ili renkontis sin dum amuzo ĉe amikino de donna Anna, tiu denove komencis al don Juan:

— Vi evitas min sinjoro kaj mi scias kial: jen vi timas, ke mi venkus vin en la luktoj de amo.

Sed don Juan respondis denove:

— Bone, bone.

Kiel mi nome rimarkis, li ne estis plu novico en servo al la virinoj — kaj sciüs ĉion kaj ĉiel.

Vidante donna, ke de tiu flanko ŝi ne sukceson, komencis rekte:

— Venu hodiaŭ post la amuzo en nian ĝardenon, mi estos tie. La najtingaloj mirinde kantas en nia ĝardeno.

— Fraŭlino ĉarma, amason da najtingaloj en la vivo mi aŭdis — (tie ĉi li ekĝemis peze) — do ili min ne plu altiras.

La fiera pri si virgulino je tio malkaŝe:

— Kaj mi?

— Kio?

— Kaj mi ĉu vin ne altiras?

— Certe jes. Neniu virino min tiel allogis.

Karto dua.

„Oni ne povas diri, ke nur malbonaj sortoj ĝar-dostaris ĉe la vivo de don Juan.

Ĉar se ni post profunda kosiderado devas nomi liajn okulojn donaco de malfavoraj sortoj, do tamen nia pozicio kaj la talaro, kiun ni portas, devigas nin aserti, ke super la lulilo de lia animo staris ankaŭ anĝelo kun la blankajflugiloj. Kaj tiu anĝelo ekloĝis en li; en la homa lingvo ĝi nomiĝas la komplezemo de don Juan.

Laika kronikisto inklinus eble aserti, ke tiu komplezemo estis samtempe malutila por tiu kavaliro kaj ne unu malfeliĉon en lia vivo kaŭzis, sed por refuti tiajn asertojn sufiĉas rememori, ke laikaj verkistoj kutimas juĝi ĉiujn aferojn laŭ vidpunkto tro tera — kaj tial eraras.

Komplezemo bonkora de l'nobelo d'Asenini estis de supera speco, kio klare jam pruvas, ke sian komencon ĝi prenis de lanugo de l'anĝelajflugiloj.

Eble sole la uzo, kiun don Juan faris de sia boncoreco, estis ne nepre mistika, eble estis eĉ tro surtera. Kaj tio estis eraŭo, tio estis fatalo.

Ĉar la komplezemon kaj bonkorecon montradis tiu kavaliro plej ofte al la virinoj. Ne ekzistis afero,

kiun li estus povinta rifuzi al virino. Kiel eremito mi ne scias, kies estadis la kulpo, ke lia komplezemo finigis ĉiam per amo.

Certa sinjorino, kun la nomo de donna Eva, ekvidis foje don Juanon, tiam ankoraŭ tre junulan kaj konatigis kun li.

Konatiginte ŝi komencis kun li tian interparolon:

— Delonge mi vidas, ke renkontante min vi alrigardas min tro arogante.

— Mi, sinjorino?

— Jes, arogante, ĉar ame.

— Mi ĵuras je l'honoro, ke ne...

— Ne trouzu, junulo, la honoron, ĉar honoro estas trezoro. Ne imagu tamen, ke min oni povus venki.

— Do ja mi eĉ ne en sonĝo —

— Ne interrompu min. Min oni ne povas venki — per la rigardoj mem, por mi oni devas perej, aŭ plenumi eksterordinarajn. Respondu al mi: ĉu vi veturus kun mi trans marojn?

— Sendube — respondis la junulo, ĉar vekigis en li lia bonkoreco kaj denaska servemo, tiu servemo kontraŭ la kunfrato.

— Ĉu vi ĉasus por mi leonon?

— Eĉ tuj.

— Ĉu vi ekrajdus furiozan ĉevalon?

— Alkondukigu ĝi al mi.

— Kaj vi rigardus okulon kontraŭ okulo al sorĉistino?

— Se mi pro ĉiopova kaj nepardonema ordono de l' patro devas edziniĝi je tiu viro, — ŝi cerbumis: — do li almenaŭ amu min. Li min almenaŭ amu, se mi lin ne amas.

Sed don Oktavio estis kvazaŭ ŝtono.

Por agi kontraŭ tio decidis la virgulino vekigi en la fianĉo ĵaluzon.

Tiutempe don Juan estis jam viro promenanta en gloro. Sufiĉis, ke li interŝanĝu vorton kun virino, kaj jam ombro faladis sur ŝian bonfammon.

(Stranga afero, ke tio ne malfervorigis la virinojn al kavaliro d'Asenini).

Jen do donna Anna decidis profiti tiu ĉi malbonan ĝloron de don Juan.

Ŝi iris foje sur la strato kun sia fianĉo kaj de kontraŭa flanko iris don Juan. Donna Anna pafis al li per la okulo tiel signifplene, ke ankaŭ don Oktavio rimarkis.

Tamen don Oktavio — nenion.

Ĉagrenigis tio la noblan virgulinon.

— Ne estas alia rimedo, mi devas konatigi kun don Juan. Tio sufiĉos por vekigi la ĵaluzon, — tian ŝi faris decidon.

Ŝi profitis la plej unuan okazon kaj mem alparolis la danĝeran kavaliron:

— Pardonu nekonata sinjoro, mi ne scias, kie estas la strato de Torros, ĉu vi ne bonvolus montri ĝin al mi.

— Bone, bone — respondis ĝrumbles don Juan kaj iris plue, ĉar jam li estis en la aĝo de sperteco

— Kun plezuro.

Tiu sinjorino postuli tamen nek viziton ĉe sorĉistino, nek senduban morton dum rajdo sur sovaĝa ĉevalo, nek ekskurson en la landon de Maŭroj, kie oni povas renkonti leonon, nek serĉadon sur la oceano de postesignoj de Kolumbo, sed post ĉiuj ĉi demandoj konkludis:

— Se tiel estas, do amu min.

Kaj oni diras, ke li ekamis ŝin.

Tiu sinjorino tamen parolis poste al siaj amikinoj:

— Jam li eniris la ŝipon naĝontan al Fez, por tie sur la sabloj dezertaj ĉasi leonojn, ĉar tiel li amas min.

Post iu tempo alia sinjorino postulis pruvojn de kuraĝo kaj komplezemo. Don Juan montris kontraŭ ŝi la saman pretecon. Oni parolas, ke tio denove finigis per amo.

Donna Eva komencis tiam disrakontadi, ke don Juan estas malnoblulo.

— De senduba morto mi savis lin, ĉar jam li estis ekrajdonta sovaĝan virĉevalon andaluzian sen selo kaj nebriditan tiel, ke li estus frakasinta la kapon kontraŭ la rokoj — kaj nur mi per la propraj manoj lin detenis... kaj tiu sendankulo anstataŭ danki delogis min kaj nun jen li forlasas min por tiu sorĉistino...

Kaj kie nur ŝi povis, ĉikanis lin.

Tamen mi, modesta monaĥo sed longjara konfidulo de pento de tiu kavaliro, kuraĝas aserti, ke se

Karto tria.

„Kiel oni scias, certa donna Anna plej multan malbonon kaŭzis al la nomo de mia pentulo, kavaliro d'Asenini.

Mi havis jam okazon legi tragedion pri tiu amo. Aŭtoro de l' tragedio sendube estas maljunulo, ĉar li ĉiumaniere klopodas malfamigi don Juanon kaj spite lin — glorigi la virtojn de donna Anna.

Certe, verko de l'arto devas iomete mensogi, tamen por kio mensogi supermezure? Tial mi riproĉas al la aŭtoro, ke li ne demandis aŭ min aŭ iu alian, sciantan, kiel efektive la afero okazis.

Kaj ĝi okazis tiamaniere:

Tiu donna Anna havis patron severan kaj tre pri si fieran. Fieran pro tio, ke li opiniis sin neerara. Tiaj homoj estas multaj, eĉ inter la kontraŭpapistoj. Fiera pri sia neeraremo la patro ordonis al la filino intersanĝi la ringojn kun iu don Oktavio.

Don Oktavio serĉis lignon kun donna Anna por havi subteno ĉe la Kortego, kie la patro de lia fianĉino posedis multoblajn influojn; ne rapidis tamen don Oktavio kun la donacoj de Amoro.

Tio kolerigis donnan Annan.

donna Eva estus ekvojaĝinta en la teron de Aztekoj, tiam don Juan estus veturinta al Aztekoj, se ŝi estus ordoninta al li rigardi en la okulojn de tigro aŭ alia bestego — li rigardus — ĉar tamen ĝvidata de stranga deziro ŝi elektis la amo kun li, do li ankaŭ konsentis je l'amo.

Ĉar tiu homo havis verŝajne almenaŭ duoble pli grandan perimetron de l'koro ol la koro de aliaj mortemuloj, do ankaŭ la bezono bonfari estis en li pli granda ol en aliaj homoj.

Unu fojon li eksciis, ke iu forlasita kaj iom malbela, sed ankoraŭ en aĝo de amo estanta virino de neniu estis amata kaj ke la viroj ridis pri ŝi. Li ekkompatis je ŝi kaj komencis fari ĝestojn pruvontajn pri lia amo al ŝi.

Ĝis mi, ermito, plenumis tiam pekon de rapideco, ĉar mi eksplodis kolere kontraŭ li:

— Stultulo! — mi diris: — ŝi ja estas monstro!
— Patro spirita — respondis tiam la nobelo: — oni ne devas ĉiam pensi nur pri si.

Longe post tiu respondo mi restadis en teologia malkvieto: ĉu konsideri tiun amon de don Juan kiel pekon, ĉu kiel bonfaron?

Ne estas donita al mi klereco en konsiderado de teraj aferoj, sed en la silento de muroj pensante pri mia malfeliĉa don Juan mi kuraĝas supozi, ke ne estis certe alia la biblia Samaritano...

En la vivo de don Juan tiel nur ĉio komplikigis, ke sur sia vojo li renkontadis tro malmulte da vunditoj kaj anstataŭe tro multe da virinoj... En tio estas la diferenco inter li kaj la Samaritano el la Skribo.

Sciante pri ĉiuj liaj okazaĵoj mi kuraĝas diri, ke lia samaritana boneco kaj komplezemo multajn, tre multajn kaŭzis al li dolorojn. Estu tio kalkulita al li antaŭ la eterneco. Amen".

Rimarke: El la cititaj en tiu ĉi karto okazaĵoj montrigus por supraĵa esploranto, ke en la vivo de don Juan estis cirkonstancoj, en kiuj la virinoj okupis postenon de atakanto Reale tamen konsiderante tio estas neblajo. La virino estas ĉiam nur viktimo de vira ruzo kaj ne ekzistas ekzemplo, ke ŝi estus deloginto. La plej bona pruvo estas, ke la virinoj mem tiel certigas.

Pro tiu ĉi pruvo oni devas supozi, ke la priskribitaj okazaĵoj havas simbolan senco. Donna Eva kaj aliaj virinoj estas — metaforoj. Kion ili estas simbolontaj, nun malfacile estas decidi. Ni esperu, ke la scienco solvos ankaŭ tiun malfacilaĵon.

SINJORO U. E. A.

Jara budĝeto 80.000 svisaj frankoj. Loĝejo por 4.500. Sep oficistoj, salajrataj sume per 25.000. Sinjoro U. E. A. ne estas proleto. Li ŝatas vivi larĝe. Foje, eĉ kotizoj kaj regulaj enspezoj ne sufiĉis. Oni devis skrapi la kapitalon. Ĉar la sinjoro estas ankaŭ rentulo. Li palpas procentojn. Bagatelajo: ĉirkaŭ 2.500. Nenio eksterordinara, ke ĝi ne kontentigas normalan bonan apetiton.

U. E. A.! Infano de Hodler kaj de Privat. De Hodler precipe, kiu donacis al ĝi sian tutan vivon kaj sian grandan havon. Mirinda forto en tiu stranga asocio, forto de memofero. En ĉiuj landoj de l' terglobo, ĉie ĝiaj noblaj delegitoj: personoj pretaj servi fremdulojn, nekonatojn nur por pruvi la praktikecon de la nova idealo. Ne kredu, ke ilin allogas la malgranda procento, deprenata de la kotizoj. Tiu kovras nur parton de iliaj propraj elspezoj. Ĉion: tempon, laboron, monon ili donas kontraŭ la sola salajro de kontentigita altruismo. Tiu armeo de noblaj soldatoj havis dignan je si komandanton. Hector Hodler, filo de fama artisto, ne hezitis oferi riĉaĵojn amasigitajn de la patra talento al idealo, kiu promesas pacon al homoj. Kiam tro frua morto forprenis lin, lia testamento donis ankoraŭ al la amata afero firman bazon de plua ekzistado.

Ĝis nun, ĉio estis en ordo. Ĉio okazis laŭ la regulo. Ĉar eŝtas regulo (ĉu ne, karaj amikoj?), ke kiam ni laboras por Esperanto, ni ne estas por tio pagataj per mono. Oni pagas nin per ridoj kaj morkoj, kaj ni akceptas tiun rekompencan, fidante kun la Majstro, ke „la nepoj nin benos, se ni paciencie eltenos“. Ni vivas ankoraŭ en Esperanto Batŝlanta por prepari Espranton Triumfantan. Kaj kiel soldatoj, kiuj preparas la venkon, ni ricevas nur frapojn kaj vundojn. Sed tio estas al ni malgrava, ĉar ni amas nian venkon. Ni estas memvolaj proletoj de l' idealo.

Proleta estis, kaj ankaŭ nun estas la tuta U. E. A. Pli ol 8000 membroj pagas, propagandas, laboras por Esperanto senpage. Mi konas tre multajn el ili, mi konas nur tre maloftajn, kiuj pensas pri propra profito. Sinjoro U. E. A. ne estas tie. Sinjoro U. E. A. sidas en Genevo.

En Genevo oni ne pagigas sin per morkoj. En Genevo estas Esperantistoj, kiuj por Esperanta laboro ricevas bonan salajron. En Genevo Esperantaj artikoloj estas pagataj per sonantaj spesmiloj. Nu, ĉu io riproĉinda en tio? Venu baldaŭ la epoko, kiam en la tuta mondo okazos la samo! Kiu pli meritas rekompencan, bonstaton ol tiuj soldatetoj de paco sindonemaj, fervoraj, entuziasmaj, kiuj estas multaj niaj junaj samideanoj? Ne burĝe ili laboras, ne burĝe ili profitas.

Sed jen la malbono: ni ne povas ĉie pagi la meritojn, ni ne havas monon por rekompenci niajn amikojn. Kaj kiam la tuta Esperantujo estas granda proletaro, ĉu estu Genevo paradizo por kelkaj? Ĉu Sinjoro U. E. A. forgesu, ke li estas samideano de proletoj? Ke ĉiu sumo elspezata de li konsistas el centimoj, oferitaj de malriĉuloj?

Tiuj vortoj sonas akre. Ili estus pli mildaj, se la domo aplikus pli multe la bonan ekonomion kaj takton. Ni rajtas postuli, ke niaj kotizoj kaj procentoj el la kapitalo sufiĉu. Ni ne volas, ke oni tuŝu la

kapitalon. Ni ne volas, ke oni petu konstante pri novaj subtenoj. Ni ne volas, ke Sinjoro U. E. A. enmiksiĝu en lingvajn disputojn, kaj dum jaroj donu ekzemplon de interna malordo.

Ŝpareme, ŝpareme, samideanoj el Genevo! Se sep oficistoj kostas tro multe, vi maldungu du. Se kvin kostos ankoraŭ tro multe, vi maldungu tri. Se la pagataj artikoloj troŝarĝas la budĝeton, vi ja petu senpagajn. Sed zorgu, ke oni ne povu diri al vi el aliaj urboj, ke vian laboron oni estas pretaj fari por kvarono de la prezo.

Tio aŭdiĝas nun tro ofte. Tion ne deziras aŭdi U. E. A.-proleto.

Jan Kostecki.

POLLANDA KRONIKO.

Bielsko. La urba konsilantaro asignis al la loka esperantista klubo la subvencion de 500 zloty kiel aprobon de ĝia ĝisnuna efikplena agado kaj por ebligi disvolvi ĉi tiun agadon tiel utilan same por la urbo kaj ŝtato kiel ankaŭ por la homaro. La movadon esperantistan tre lerte gvidas ĉi tie D-ro Haas, delegito de U. E. A.

Kraków. La 4-an k. m. okazis la ĝenerala kunveno de „Pola Esperantista Klubo“, dum kiu la malnova estraro post ricevo de aprobo por sia tutjara agado estis preskaŭ senŝanĝe reelektita.

En komenco de aprilo — la dato ankoraŭ nefiksita — okazos en la Krakova Radjo prelego de nia kunlaboranto S-o Hodakowski: „W kajdanach granic językowych“ (En la katenoj de la lingvaj limoj); ni atentigas pri tio la radjoamatorojn kaj petas, ke ili sendu poste al la Radjostacio la esprimojn de aprobo kaj postulojn de daŭrigado de la prelegoj pri kaj en Esperanto.

Radom. S-o Jan Wojtas gvidas du kursojn por komencantoj kaj progresintoj. La kursojn partoprenas 17 personoj.

Warszawa. La 22-an febr. okazis ĝenerala kunveno de l' Varsovia grupo de Pola Esperantista Asocio, dum kiu oni elektis novan estraron, kiu laŭ la decido de Poznanja kongreso en la j. 1923 funkcias kiel Centralo de P. E. A. Elektitaj estis: prezidanto — Prof. Dr. Jerzy Loth, Vicprez. — Ing. Kazimierz Tymiński, ĝenerala sekr. — Jerzy Bąbała (prez. de la grupo en Radom), kasiŝto — Włodzimierz Miernicki, del. de U. E. A., referanto por la aferoj de la grupoj — Mieczysław Trochimowski, estraranoj — Eugenjusz Popielawski, Janina Burkathówna, Kazimierz Zajączkowski. La ĝenerala kunveno rekomendis al la estraro daŭrigi la laborojn por ŝanĝi la regularon en la direkto de plena egalrajtigo de la filioj de P. E. A. Krom tio oni elektis s-on red. Stanisław Karolczyk honora membro de l' Asocio. La nova estraro vigle komencis labori kreante fortajn ligilojn organizajn kun la provincaj grupoj.

P. E. A. kune kun la Pola Akademia esp. Societo luis novan loĝejon ĉe la str. Wspólna 58. m. 2. (la grupoj ne intermiksu kun la adreso de l' Referanto por la aferoj de la grupoj: Wspólna 64. m. 29.), kie kunvenas lunde la akademianoj, jaŭde la estraro de P. E. A.

kaj sabate kunvenoj societaj, raportaj kaj diskutaj. La 5-a mart. okazis la malfermo de l' nova loĝejo, dum kiu parolis la prez., prof. Loth kaj la prez. Bąbała. La 16-an parolis s-o Bąbała pri la temo: Esperanto kaj naciismo. La 18-an okazis dua en ĉi tiu jaro balo esperantista kun koncerto kaj humoraj aranĝaĵoj, kiu tre bone sukcesis.

La 4. II. okazis ĝenerala kunveno de Pola Akademia Esp. Societo, dum kiu estis elektitaj al la estraro: prez. — J. Bąbała, vicpr. — M. Trochimowski, I sekr. — Halina Weinsteinówna, II sekr. — Stanisława Śmiełowska, kas. — Aleksander Nietupski.

Wilno. La en antaŭaj N-oj de nia gazeto anoncitaj akademie kvaronhoraj okazantaj dufoje en monato en la ĉi-tiea Radjostacio danke al la lerta kaj bonhumora aranĝado de s-o prokuroro R. Sakowicz havas plenan sukceson kaj konkiras por nia afero konstante ĉiam pli grandajn rondojn da simpatiuloj kaj varbas novaj esperantistojn.

Żychlin. Direktoro de la loka komerca lernejo inĝ. Z. Weber, konsciante la gravan rolon de Esperanto, enkondukis ĝin en la lernejan programon. La kurson kun 60 gelernantoj gvidas loka Delegito de UEA dro Romuǎld Sołoniewicz, kiu organizas ankaŭ specialan kurson por popolaj instruistoj.

KRONIKA ZAGRANICZNA.

Szwecja. Sztokholm: 13. XII. u. r. urządzono tu święto książki esperanckiej. Wystawa i sprzedaż książek dały piękne rezultaty. Podczas wystawy produkowano nowe esperanckie płyty gramofonowe.

„Svenska Esperanto-Tidningen“ donosi, że ostatnio poddało się w Sztokholmie egzaminowi wiadomości elementarnych z esperanta 45 osób, zaś 3 osoby otrzymały dyplomy ukończenia kursów wyższych.

20. I. b. r. odbył się publiczny egzamin sześciu ostatnich kursów, prowadzonych przez ks. Andreo Ĉe. Równocześnie poddano egzaminowi klasę uczennic szkoły ludowej, którą uczył esperanta naucz. E. Malmgren według metody ks. Ĉe. Przy sposobności złożył egzamin hindus Lakshmiswar Sinha, nauczyciel literatury i slojdu w sławnej szkole Rabindranata Tagore w Kalkucie, który odbywa w Sztokholmie kurs slojdu szwedzkiego. Pan Sinha wykazał dużo znajomości języka esperanto i otrzymał świadectwo „Szwedzkiego Esp. Instytutu“.

Sundsvall: P. Tyberjusz Morariu prowadzi kursa w gimnazjum i szkołach ludowych, oprócz tego urządza odczyty w okolicy, przy czem zakłada również koła esperanckie. Liczba słuchaczy na odczytach wynosiła przeciętnie 200, 100, 100, 50, 325 słuchaczy.

Czechosłowacja. Praga: W dniach od 11—15. VIII. 1929 odbędzie się w Pradze XIV. Kongres „Internacia Katolika Unnigo Esperantista“. Uczestnicy XXI. Powszechnego Esperanckiego Kongresu

w Budapeszcie będą mieli dobrą okazję do wzięcia udziału w kongresie I. H. K. E. (Espero Katolika).

Niemcy. Berlin: W Berlinie istnieje w obecnej chwili 18 grup i towarzystw esperanckich. W dniu 15. I. br. odbyło się Walne Zebranie tych grup, przyczem obrano nowy Zarząd. Zebranie zakończono przemówieniami na tematy esperanckie.

P. Martha Root z Nowego Jorku, propagatorka sprawy Bahaa urzęduje w Berlinie, Monachjum, i 20 innych miastach Rzeszy odczyty o sprawie Bahaa, poczem w przejeździe na wschód do Chin i Japonji zatrzyma się w Warszawie na 2 tygodnie.

Poczdam: Tut. Grupa Esperantystów zorganizowała kurs dla 30 policjantów. Prowadzi kurs p. W. Szaliński. Naczelnik policji jest dla sprawy bardzo przychylnie usposobionym.

Austria: Villach. Szkoła ludowa Villach I. wzięła udział w wystawie obrazów dzieci szkolnych w szkole elemetarnej Arako w Nagoji — Japonja, wysyłając tam swoje prace szkolne. Nauczyciele japońscy tej szkoły rewanżując się przysłali do szkoły Villach I. malowidła dzieci japońskich, widokówki i książki ilustrowane do czytania, które umieszczone znów na wystawie szkoły w Villach wzbudziły wielkie zainteresowanie się zarówno wystawą, jak też i Esperantem.

Bułgaria: Sofja. Sofijska Izba Handlowa dała Sof. Towarzystwu Esperanckiemu subwencję w kwocie 1000 lewów. Spodziewane są również subwencje od innych instytucyj.

Francja: Grenoble. W głównem stowarzyszeniu studentów oraz w klubie studentów inżynierji odbyły się przemówienia esperanckie prof. Instytutu Elektrotechnicznego — prof. Dejean.

Paryż: W dniu 3. II. br. odbyła się w Sorbonie wielka publiczna manifestacja na rzecz esperanta pod protektoratem i prezesurą p. Cazals, deputowanego i prezesa Komisji Parlamentarnej dla szkolnictwa. Przemówienia p. Guadet, Carta i Bobris były transmitowane przez radjo.

Japonja: Tokio. Tokijska radjo-stacja JOAK. utworzyła radjowy kurs esperanta od 10 do 29. XII. z. r. po pół godziny dziennie pod kierownictwem p. Ooi-Manabu, członka „Japana Esp. Instituto”. Kurs zyskał 3000 nowych esperantystów.

W tych dniach nastąpiła reorganizacja Federacji Studentów Esperantystów, założonej w r. 1922. Federacja obejmuje słuchaczy 5 uniwersytetów, 3 kolegijów, 4 wyższych uczelni i jednego kolegjum żeńskiego. Prezesem federacji został obrany Dr Nişi z fakultetu medycznego.

P. Oosaua-Toşio, nauczycielowi w Saka udało się wprowadzić esperanto, jako przedmiot nadobowiązkowy do wyższych klas szkół elementarnych w Saka, Nişina-Gnu i Naganoken.

Tuskiewicz Bronisław.



UZUPEŁNIENIA GRABOWSKIEGO.

obojętny — seninteresa
 obolały — suferanta
 obszar — terspaco
 obszerność — detalvasteco
 obwieszać — pendokovri per
 ocean — marego
 ociekać — deguti
 odrażać (jący) — mallogi (a)
 odtąd — de tiam, deposte
 oduczyć (się) — dekutimigi (-sin, -iĝi)
 oścież, na — plenangule, -larĝe
 oskarżać — akuzi
 palec, na palcach — piedfingre,
 -pinte

pielgrzymka — pilgrimiro
 pieniący się — ŝaumspiranta
 płatek — petalo
 po, jedno po drugim — sinsekve
 podzięką — dankesprimo
 pomieszać — erarmiksi
 potakiwać — kapjesi
 potępienie (rel.) — malsavo
 powalić — paffaligi
 pozbywać się — senigi sin de
 pręcik — stameno
 próbować — veturprovi (automobi-
 lon)

przeczesać — alikombi
 przeczyć — kapnei
 przedziwny — mirbela
 przepominać — malmemori
 przespąć — trodormi
 przeżycie — travivajo
 przygwoździć — fiksnajli
 przykładowy — ekzemplodona
 przykuwający — atentostreĉa
 przypisywać — atribui
 przywiędnąć — velketi
 pstry — mikskolora
 robactwo — fiinsekto
 rozbeczeć się — ekploregi
 rozchodzić się o — temi pri
 rozciągać — malfaldi
 rozczarować (-anie) — senreviĝi
 (-iĝo)
 rudera — domaĉo
 rwać sobie włosy — tirŝiri al si la
 harojn

ryć w piasku — fosjeti sablon
 ściekać — gutflui
 sklepienie — volbo
 śledzić — rigardsekvi, okul-
 smarować — ŝmirdeseĝni
 strony, z drugiej — aliparte
 sukiennice — draphalo
 targ — vendoplaco
 tępy — malsprita
 tęsknić za ojczyzną — hejmsopiri
 trzaskać (biczem) — vipkraki
 trzoda — ĝrego
 uciążliwy — penplena
 uciskać — persekuti (opresi nie jest
 używane)

ujście — enmariĝejo
 unosić się — ŝvebi
 usposobienie — karaktero
 usługowy — helpema, servopreta
 wierzchowiec — rajdĉevalo
 willa — vilao (villo skreślić)
 wnieść się — ekloĝi
 wpaść — kurenfali
 wrażliwy — impresiĝema
 wybrukować — plenpavimi
 wypatrywać sobie oczy — rigardfo-
 ruzi okulojn
 wywalać (oczy) — streĉmalfermi
 (okulojn), ĝapi

wyżebrać — almozelpeti
 wzdychać — sopirĝemi
 zabijać — mortbati
 zachmurzony — nubmiena
 założenie — bazaserto
 zamurować — masonbari
 zapijać — trinki repaciĝon
 zaryglować — riglofermi
 zaśnieżony — neĝblovita
 zastrzelić — mortpafi
 zasypywać — ŝutkovri
 zatłuścić — grasmakuli
 zatrzasnąć — frapfermi
 zawieszać — pendornami
 zawody — luktado
 zgrabiać — rastkolekti
 zmęczony od stania — starolaca
 zziajany — kur-, ĉaslaca



UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO.

POLA TERITORIO. Ĉefdelegito: J. Sapiro, Lipowa 33, Białystok.
OFICIALA BULTENO No 6.

ĈENO DE VARBANTOJ. Nia alvokoj al la membroj, ke ili bonvole helpu al la Delegitoj, varbante novajn membrojn por nia Asocio, havis tre bonan efikon. Ni ricevis tutan aron da novaj aliĝoj pere de niaj membroj. Ĉiuj varbintoj akceptu nian plej varman dankon pro ilia intereso kaj kunhelpo al nia internacia organizado Esperantista! Ni ekspedis al ĉiuj varbintoj la de ili elektitajn premiojn. Varbintoj, ne indikintaj, kiun premion ili deziras, ricevis premion laŭ elekto de la Ĉefdelegito el la listo, anoncita en niaj varbiloj. Bona ekzemplo por ĉiuj niaj membroj estu la ĉeno de varbantoj, formiĝinta en Krakovo. Unu el la samideanoj komencis tie varbadon de novaj membroj. La novevarbitoj tuj mem varbis pluajn, tiuj lastaj ankaŭ ne restis sen laboro kaj siaflanke varbis en la rondo de siaj amikoj novajn membrojn por UEA. Ni varme rekomendas al niaj membroj tiajn „ĉenojn de varbantoj“. Varbmateriojn por tiu celo volonte disponigos al la membroj la Delegitoj aŭ la Ĉefdelegito.

MALKARA ABONO DE „POLA ESPERANTISTO“ Pli ol 50 Membroj — Abonantoj de UEA en Polujo profitis jam la eblecon ricevi „Polan Esperantiston“ dum tuta jaro por preskaŭ duona prezo (5 zł. anstataŭ 8 zł.). Ni ripetas, ke ĉiu Membro — Abonanto de UEA, paginta sian kotizon por la jaro 1929 rajtas profiti tiun favoran aranĝon. La malaltigita abonpago zł. 5.— estu pagata de ili samtempe kun la kotizo de MA aŭ poste aparte. Tiujn abonpagojn akceptas la lokaj Delegitoj kaj la Ĉefdelegito. Abonpagoj, senditaj de la membroj direkte al la administracio de „Pola Esperantisto“ ne ĝuas rabaton, tial bonvolu pagi nur al la Delegitoj resp. Ĉefdelegito.

STATO DE UEA EN POLUJO. La 1-an de Marto 1929 UEA havis en Polujo 268 membrojn (83 M, 180 MA, 2 MS kaj 3 DM). Konsiderinda estas la nombro de novaj membroj, sed bedaŭrinde ne ĉiuj malnovaj membroj bonvolis repagi sian kotizon por la nuna jaro. Ni varme alvokas ĉiujn malnovajn membrojn, ke ili bonvolu repagi kiel eble plej baldaŭ sian kotizon al la Delegito de sia loko aŭ al la Ĉefdelegito. Ĉiuj pasintjaraj Membro — Abonantoj, ne repagintaj sian kotizon por 1929, ricevis tamen la numerojn de „Esperanto“ ankaŭ por la nuna jaro, ĉar ni konsideris, ke eble ne ĉiuj povis baldaŭ pagi la koncernan sumon. Nun ni anoncas al la nerepagintoj, ke la aprilan numeron de „Esperanto“ ricevos nur la Membro — Abonantoj, kiuj repagis sian kotizon por 1929. Tial, ĉiu nerepaginto bonvolu rapide plenumi sian devon.

Białystok, la 1. 3. 1929.

J. Sapiro, Ĉefdelegito de UEA.

ADMINISTRACIAJ SCIIGOJ.

GARANTIA FONDO DE „POLA ESPERANTISTO“.

Por Garantia Fondo de „Pola Esperantisto“ pagis jam:

D-ro Rosenstock por XI. — 10 zł, por XII. — 10 zł. por I. — 10 zł.
S-ino Rubinstein por XI. — 5 zł. por XII. — 5 zł. F-ino Weinsberg
por XII. — 5 zł. por I. — 5 zł. D-ro Róbin (Warszawa) — 20 zł.

!! VIVU SEKVONTOJ !!

NIAJ REPRESENTANTOJ EN BIAŁYSTOK, KATOWICE, PARIS KAJ WARSZAWA.

Ni atentigas niajn ŝ. gelegantojn, ke ni donis reprezentadon de nia revuo en Białystok al „Esperanta Societo Zamenhofa“. Kupiecka 49, en Katowice al „Societo de Esperanto Amikoj“ Wawelska 3, en Paris al s-o Salo Grenkamp, rue de Vaugirard 4. en Warszawa al „Pola Studenta Esperantista Societo“ Leszno 99 m. 5. Bonvolu do aboni, pagi anoncojn, mendi librojn kaj gazetojn ktp. pere de niaj reprezentantoj.

Libreja Fako de „Pola Esperantisto“.

Kraków, ul. Smoleńska 9. Konto PKO. 406.660.

REKOMENDAS :

Albanio -- Gvidlibro	0.60
Albumo de l' VIII en Kraków. Luksege eldonita kun 600 fot.	15.00
Ama stelaro	1.10
An-Ski -- Dibuk. Teatraĵo	1.25
Avsejenko -- Fraŭlino Suzano	2.00
Baŭcki -- Kuzeto. Komedio en trad. de S. Grenkamp	0.60
Bonnsels -- Ŝolandro	2.20
Brüggemann -- Dua legolibreto	0.90
Bujwid O. prof. -- Kvin prelegoj pri bakterioj	1.00
Bukedo -- I. kaj II. Rakontoj de diversnaciaj aŭtoroj po	1.20
Butin -- Faŭsto. Komentario al la I-parto	0.60
Combe -- Dankon	0.45
Czubryński -- Esperanto i Esperantyzm	1.20
-- Esperantyzm. Wyd. II.	3.00
Dobrzański -- Al mokantoj	0.45
Dreyfus -- La vangfrapo	1.00
Dumas -- La kolomba premio	1.00
Fredro -- Consilium facultatis. Komed. trad. Ant. Grabowski	1.60
Grabowski Ant. -- Nova Antologio	1.60
-- El Parnaso de popoloj. Poemaro (bind.)	7.50
Grenkamp-Kornfeld -- Krioj de l'koro. Poeziaĵoj	0.50
-- Penseroj. Legindaj precipe en kursoj	0.75
Grillparzer -- La monaĥejo ĉe Sendomir	1.30
Gryff -- W sprawie nauki języków obcych	0.50
Hebbel -- Gyges kaj lia ringo	6.50
Ilustrita Gvidlibro tra Pollando kaj Danzig—Gdańsk, eldon. de la P. E. D. Kraków	1.50
Jotcka -- Per tolboato	0.45
Jung -- La alta kanto de la amo	1.80
Kant -- Al eterna paco	4.40
Kaplan -- Akordoj esperantaj	0.80
Karinthy -- Morgaŭ matene	2.60
Klucz do Esperanta -- Brzydkie kaczątko	0.60
Koch -- Albrecht Dürer	3.00
Kongreslibro de l' VIII. en Kraków. Riĉe ilustrita	1.00
Kriss -- Melodioj de l' nokto. Poeziaĵoj	1.00
Lange -- Libroj de profetoj, ses poemoj; trad. Ant. Grabowski	1.50
Lessing -- Minna de Barnhelm	4.30
Liem 'tjeng Hie -- Javaj legendoj kaj fabloj	1.85
Lippmann -- Sprachliche Gutachten	2.00
Malgranda terbiblio	2.00
Mickiewicz -- Improvizacio de Konrad	0.50
-- Sinjoro Tadeo, trad. Ant. Grabowski	6.50
Molière -- L' avarulo	1.80

Multatuli — Historio de Saidjach kaj Adinda; eld. Liem Tjong Hie, Semarang — Java	1.85
Oberrotman kaj Jung — La lastaj tagoj de D-ro Zamenhof	2.60
Petöfi — Johano la brava	2.20
Polaj Kristnaskaj Kantoj	0.35
Privat — Vivo de Zamenhof	5.40
Prozo el danaj-norvegaj aŭtoroj	1.50
Przybyszewski — La neĝo. Dramo	3.00
Ramo — En Svislando	4.80
Reymont — En fumejo de l' opio, novelo; trad. D-o K. Bein (Kabe)	1.20
Rieck — Oni ridas. Humoraĵoj	1.40
Samideano — No I.	0.45
Schmidt — La amkonkurantoj	0.85
Słowacki — La patro de pestuloj el El-Arish, trad. Ant. Grabowski	1.40
Staff — Aŭtunaj agordoj, trad. Tuwim	1.00
Steier — Unuagrada legolibreto	0.45
Streidt — Esperanto Lehrbuch I. kaj II. po	1.95
Ŝlosiloj esperantaj en 10 lingvoj	1.00
Tatro kaj Zakopane	0.50
Trochimowski — Kwestja języka międzynarodowego 10 ekz.	1.00
Turno — Kompletny podręcznik Esperanta; wyd. III.	1.25
— Wyższy kurs	1.50
Vigny — La intervidigo kaj nekonita dialogo	0.90
Wiesenfeld — Galerio de Zamenhof. Kun 18 portretoj	2.40
Wysłouch — El lando de ruinoj	0.45
Zamenhof, D-o Leono — Mia liro	1.10

Poŝtkartoj propagandaj „Babel“ 10 pecoj	0.50
Glumarkoj „Babel“ 10 pecoj	0.10
Insignoj esper. (steloj) po 1.10, 1.20, 1.30, 1.40, 1.50, 1.70, 2.10, 2.30, 4,50.	

La verkoj de Zamenhof:

Fundamenta Krestomatio	5.60
Fundamento de Esper. (5-lingva)	2.30
Lingvaj Respondoj	2.80
Proverbaro Esperanta	2.70
Andersen — Fabeloj I. kaj II. parto po	4.40
Goethe — Ifigenio en Taŭrido	3.30
Gogol — La Revizoro	3.30
Heine — La Rabeno de Baŝaraĥ. La Gimnazio	2.30
Molière — Georgo Daudin	1.75
Orzeszko — Marta	5.50
Schiller — La Rabistoj	3.30
Shakespeare — Hamleto	2.75

Nur antaŭpago. — Por sendkostoj aldonu 10%

Por rekomendita sendaĵo plu 0.50 zł. La sendaĵon nerekomenditan ni ne garantias.

FILATELISTOJ! Mi posedas grandan kvanton da poŝtmarkoj tre valoraj, francaj ankaŭ transoceanaj kaj de diversaj kolonioj. Mi interŝanĝas kun ĉi. Respondo garantiata, ĉiam akurate. Mi ne sendas unue.

ADRESO: s-o Joseph Prouzat, 2, Place St. Symphorien, 2. Versailles (S. et O.) Francujo.

UWAGA! WAŻNE DLA KORESPONDUJĄCYCH Z ZAGRANICĄ!

A T E N T O!

Apartaj represoj de aperinta artikolo en decembra n-o de P. E. pri

„POLAJ KRISTNASKAJ KANTOJ“

kun esperanta traduko de du kantoj kun muziknotoj estas aĉeteblaj ĉe:

Admin. de Pola Esperantisto po 0.35 gr. aŭ 0.20 sv. fr.

Por grupoj rabatita prezo minimume 10 ekz. 2.70 zł. aŭ 1.80 sv. fr.

INTERNACIA MEDICINA REVUO
GRAVA MEDICINA GAZETO EN ESPERANTO

Ĉefredaktoro: Profesoro *Vanverts* (Lille), kunlaborantaro internacia. Oficiala organo de la Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio (TEKA)

Adreso de Redakcio kaj Administracio:

D-ro Kempeneers, 20, rue aux Laines, Bruxelles (Belgujo). Abonprezo: 1 dolaro jare, sendota (en Pollando) al D-ro St. Wysokiński Warszawa, Marszałkowska 81 a. m. 8. P. K. O. 16.356.

Internacia Pedagogia Revuo

Oficiala organo de Tutmonda Asocio de Ĝeinstruistoj Esperantaj
(T A G E)

Specimenon petu de Karl Kröber, Riesa/Elbe, Weststr. 4.

LIBREJA FAKO

DE POLA ESPERANTISTO.

REKOMENDAS:

	Zl.
Dobrzański — Al mokantoj	0.45
Fredro — Consilium facultatis. Komed. trad. Ant. Grabowski	1.60
Grabowski Ant. — Nova Antologio	1.60
— El Parnaso de popoloj. Poemaro (bind.)	7.50
Gryff — W sprawie nauki języków obcych	0.50
Lange — Libroj de profetoj, ses poemoj; trad. Ant. Grabowski	1.50
Liem Tjong Hie — Javaj legendoj kaj fabloj	1.85
Mickiewicz — Sinjoro Tadeo, trad. Ant. Grabowski	6.50
Molière — L' avarulo	1.80
Multatuli — Historio de Saidjach kaj Adinda; eld. Liem Tjong Hie, Semarang — Java	1.85
Prozo el danaj-norvegaj aŭtoroj	1.50
Przybyszewski — La neĝo. Dramo	3.00
Reymont — En fumejo de l' opio, novelo; trad. D-o K. Bein (Kabe)	1.20
Słowacki — La patro de pestuloj el El-Arish, trad. Ant. Grabowski	1.40
Staff — Aŭtunaj agordoj, trad. Tuwim	1.00
Zamenhof, D-o Leono — Mia liro	1.10

Poŝtkartoj propagandaj „Babel“ 10 pecoj	0.50
Glumarkoj „Babel“ 10 pecoj	0.10
Insignoj esper. (steloj) po 1.10, 1.20, 1.30, 1.40, 1.50, 1.70, 2.10, 2.30, 4.50.	
La verkoj de Zamenhof:	
Fundamenta Krestomatio	5.60
Fundamento de Esper. (5-lingva)	2.30
Lingvaj Respodnoj	2.80
Proverbaro Esperanta	2.70
Andersen — Fabeloj I. kaj II. parto po	4.40
Goethe — Ifigenio en Taŭrido	3.30
Gogol — La Revizoro	3.30
Heine — La Rabeno de Baŝaraŝ. La Gimnazio	2.30
Molière — Georgo Daudin	1.75
Orzeszko — Marta	5.50
Schiller — La Rabistoj	3.30
Shakespeare — Hamlato	2.75

Nur antaŭpago, — Por sendkosto aldonu 10%.
 Por rekomendita sendaĵo plu 0.50 zl. La sendaĵon nerekomenditan ni ne garantias.

K R A K Ó W, U L. S M O L E Ń S K A 9.
 K O N T O P. K. O. 4 0 6. 6 6 0.